

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Jen la simbolmarkoj de nia organizo!



La supraj markoj, por uzo kiel banderolo kaj kiel memstara marko, estis deciditaj en la 1-a Ĝenerala Kunveno de Esperanto Jokohama en la 20a de junio.

Ni faris publikan varbadon de la simbolmarko ĉe retejo, kiu peras proponojn kaj ofertojn pri etaj laboroj, nomata "Cloud Works", kun honorario je 10800 enoj, en junio. Venis entute 31 ofertoj en 2 semajnoj. Nia estraro antaŭelektis 7 el ili kaj 22 personoj en la Ĝenerala Kunveno fine elektis la markojn.

Vi rimarkos la verdan stelon en la marko. Krom ĝi, kio estas? Jen du elementoj.

(1) Ĉirkaŭ la stelo estas kvazaŭa rondo, kiu simbolas Spektoradegon de Jokohamo nomatan "Cosmo Clock 21" (=Kosmo-Horloĝo de la 21a jarcento). Ĝi ekfunkciis en 1989, sed movita al la nuna loko en 1999. Ĝi estas 100 metrojn granda laŭ diametro, kaj la plej pinta punkto altas je 112 metroj super la maro. Ĝi estas unu el la simboloj de la moderna Jokohamo.

La foto de la Radego en tiu ĉi paĝo montras ankaŭ la apudan hotelon. En tiu ĉi ĉirkaŭo okazis la 92a Universala Kongreso en 2007.

(2) Apud la Radego estas tur-forma desegnaĵo. Ĝi simbolas "Land Mark Tower" (=Turo por Land-orientado), 296-metran konstruaĵon kun 70 etaĝoj, aperintan en 1993. Ĝi estis siatempe la

plej alta domforma konstruaĵo en Japanio (nun la 2a plej alta), kaj ankaŭ simbolas modernan Jokohamon. Pri tio vidu la foton en la venonta paĝo.



- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawaku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
- Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

La noktoscena foto montras la konstruaĵon altegan kaj 3 aliajn konstruaĵojn, fone de 3 el la estraranoj de nia organizo, fotita en februaro 2015 post prelego pri Esperanto en la najbara loko.



ambaŭ fotoj de s-ro Doi Hirokaz

NIAJ PLANOJ

(Se ne aparte menciite, la loko estas Kanagaŭa-Kenmin Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohamo)

*Speciala konversacia klaso, kun Wajik Iwanicki
julio 25, 15h00-17h00

*Movada Foiro ĉe la 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio
julio 25, 19h00-21h00

En la budo de Japana Esperanto-Instituto, ankaŭ broŝuro de nia rondo estos montrata.

*Prelego de Heidi Goes
aŭgusto 30, 14h30-16h30, ĉe Tikyuu-Plaza (Tergloba Placo)

Laŭ la nuna plano, ŝi parolos pri “Konga Reĝlando – ĝia esploro el lingvaj vidpunktoj”, kun paralela traduko en la japana.

*Ekspozicio pri agadoj de internaciaj amikecoj sept. 5 kaj 6, en la ekspozicia halo

*La 100-a legokunsido, pri “Padma, la eta dancistino” de Tibor Sekelj
sept. 12, 13h00-15h00, ĉambro 707

Okazis la 1-a Ĝenerala Kunveno

— de la Ne-Profitlela Organizo Esperanto Jokohama —

junio 20, 17h00-19h30, ĉambro 710

Kunsidis 22 personoj, kaj kun 30 mandatoj plus observanto, kaj la 1-a Ĝenerala Kunveno havis lokon en la kutima kunvenejo, sub la prezido de s-ino Miyazaki Hideko.

Post salutoj kaj lego de la gratula mesaĝo, la jara plano de la organizo fiksita jarkomence, kaj la labordivido de la estraranoj estis konfirmitaj per aplaŭdoj. Sekvis elektado de la simbolmarko, kaj el 7 kandidatoj, la verko montrita en la fronta paĝo estis elektita.

Oni raportis, ke la organizo fariĝis subtenanto de la Muzeo de Kanagaŭa pri Moderna Literaturo, kaj la organizo ricevas biletojn senpagajn por eniro en la muzeon, kaj tial oni petu bileton ĉe la sekretario, s-ro Doi Hirokaz.

Post la oficiala parto, estis sinprezento de partoprenantoj, kaj sekvis gastoparolado. La parolo estis de s-ino Takaoka Miĉiko (nia

membro), kiu gvidas Ne-Profitlelan Organizon Cesla por Haitio. Tiu grupo helpas la landanojn de la insula lando Haitio en la Kariba Maro, por ke geknaboj ricevu edukon en lernejoj. La lando estis atakita de tertremego en 2010, kaj estante en financa malfacilo, ankoraŭ la lando suferas de la detruo de la tertremo.

Saluto de la Prezidanto (resumo)

Okaze de la ekiro de Esperanto Jokohama, mi parolos pri la plano pri la Japana Esperanto-Kongreso. Nur lastatempe, la loko de la 103-a Kongreso estis fiksita, nome ĝi en oktobro 2016 okazos en Urbo Oumi-Haĉiman en Gubernio Ŝiga, unuafoje en tiu gubernio. Ricevinte informon pri tio, ni pretas oficiale anonci nin kiel kandidaton por la 104-a Kongreso en Jokohamo. (Sibayama Zyun’iti)

Gratulo el najbara rondo en Maĉida

Karaj anoj de Esperanto Jokohama!

Reprezenante Esperanto-klubon de Maĉida, mi elkore gratulas kaj kunĝojas je renaskiĝo de via asocio. Kvankam via asocio nun apartenas al “ne-profitcela organizo”, mi esperas, ke ne nur vi kiel asocioj, sed ankaŭ civitanoj de Jokohamo kaj eksterjokohamaj esperantistoj profitos estonte el la ĉifoj sukcesa transformiĝo kaj oficiala agnosko kiel civitana

organizo.

“Hama-rondo” ĉiam estis modelo por najbaraj kaj aliaj Esperanto-kluboj. Mi certas, ke ankaŭ la nova “Esperanto Jokohama” daŭre brilos lume inter la verdaj steloj en la esperantuja firmamento.

Kun koraj salutoj el najbara urbo,

Kimura Goro Christoph

VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (8)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

Somere de 1938 Vasilij Eroŝenko partoprenis la Unuan Tutrusian ŝakturniron de blinduloj, kie li gajnis la 3-an lokon. Ludis Eroŝenko ne tre forte; sed liaj ŝakpartioj ĉiam estis originalaj, same kiel liaj fabeloj. Li ludis bele kaj poetike. Lia lernanto V. Perŝin, sciencisto de Orientologia Instituto de la Scienca Akademio de USSR, tiel rimarkis pri lia ludado: “Estas nesufiĉe diri, ke Vasilij Jakovleviĉ arde amis ŝakon. Li ĝuis la ludon, kiel estetulo ĝuas la bildon de amata pentristo. En la ŝako por li kunfandiĝis la principoj de etiko kaj de estetiko, kaj la ŝakpartio estis la akto de kreado de la vera arta majstroverko”. Kaj ĉukĉoj, amikoj de Eroŝenko, eĉ timis lian ŝaktabulon, opiniante ĝin la potenca ilo de ŝamano.

Iam en Parizo, Vasilij Eroŝenko ludis remie (egale) kun mem Aljohin, en la ŝakista kafejo “Reĵans”. Sed poste li memoradis tiun ludon kun la miksita sento de ĝojo kaj amaro. Li timis, ke l’ mondĉampiono simple kompatis lin, blindulon. Sed Eroŝenko tre serioze rilatis al la ŝako, kaj ne toleris, kiam eĉ tre forta kontraŭulo intence cedis al li. Kiam li estis jam grave malsana, li ĉiun sian gajnitan partion en ŝako perceptis kiel ankoraŭ unu venkon super la morto.

Kaj la vivo en Kuŝka iris laŭ sia ordo: infanoj disvolviĝis; instruistoj indigniĝis pro la stranga direktoro, kiu devigas ilin labori plene, ne ŝtelas sur laborloko mem kaj ne lasas ŝteli al ili; kontrolkomisionoj skribis incitite neaprobajn raportojn...

Kiam komenciĝis la Dua Mondmilito, kiu por nia lando estis la Granda Patruja milito, en la internulejon oni komencis akcepti vidpovajn orfajn infanojn; blinduloj restis tre malmultaj, kaj en 1946 oni translokigis ilin al unuigita

internulejo de blinduloj kaj surdomutuloj en u. Ĉargou. Nun, kvankam ĉe ni aktuale ne okazas milito, oni ankaŭ kunigas tiajn internulejojn. Sed en tiu tempo Eroŝenko, kiel honesta homo, ne volis subteni tiujn monstrajn ŝanĝojn, kaj forveturis al Moskvo. Verdire, oni ne tro haltigis lin surloke, ja honestaj homoj ĉiam malhelpas al multaj...

En Moskvo li komencis labori kiel instruisto de fremdaj lingvoj en la sama porblindula lernejo, kie li mem iam lernis. Kiel ĉie, infanoj lin amis, superuloj – ne. Malfacile estis en Moskvo ankaŭ tial, ĉar li, ĉiam helpema kaj grandanima, lasis loĝi en sia ĉambro junan geedzan paron de blinduloj, kiuj ne havis kie loĝi. Sed kiam li revenis, evidentiĝis, ke ili tute ne intencas liberigi la ĉambron kaj cedi ĝin al ĝia vera posedanto. Eroŝenko loĝis jen ĉe amikoj, jen subluante partojn de ĉambroj. Sed kiam oni aludis al li, kiamaniere trakti la “gastojn”, traleginte fablon pri sturno, kiu forpuŝis el sia nesto impertinentajn paserojn, Eroŝenko respondis: “Tio pri birdoj. Sed ni estas homoj”. El siaj negrandaj rimedoj li ofte helpadis al blinduloj, prunedonante al ili monon, kaj poste li ĝenis rememorigi pri la ŝuldo. Malnoblaj homoj ofte uzadis tiun “ŝancon”, sed Eroŝenko ne atentis malnoblulojn. Li vivis por aliaj homoj.

Estinta tankisto, blindiĝinta dum milito, 20-jara V. Bogdanov tiel rememoris pri Vasilij Eroŝenko: “Mi ŝuldas al li ĉion. Li inspiris min kredi je la vivo, helpis iĝi plenrajta ano de socio, sed ne ĝemanta kriplulo aŭ memmortiganto”. “Ĉio dependas nur de vi”, - asertis Eroŝenko. Li povis helpi nur al fortaj homoj; kaj homoj apud li fariĝis fortaj.

(daŭrigota)

99a Legokunsido

En la 6a de junio, ni havis la 99an Legokunsidon por “Modernaj Robinzonoj” de Teodor Schwartz, kaj ses personoj partoprenis.

"Modernaj Robinzonoj" de Teodoro Schwartz

Mizro Iwaya

La aŭtoro estis la ĉefredaktoro de Literatura Mondo en la unua periodo. Sed li kontribuis manuskripton al la gazeto tre malofte. Unu el la raraj esceptoj estas tiu ĉi verko. Ĝi estas viva dokumento de la rifuĝinto el militkonfuzita Siberio.

Oni tuj rememoras la siberian ĝemelon de Julio Baghy. Ankaŭ li suferis multon en la sama epoko en la sama regiono. Sed li estis pli juna kaj pli subranga ol tiu aŭtoro. Tial li povis fari nenion krom kelkaj prezentoj de sia profesia aktorado. Dume la aŭtoro faris intrigon kun la kolegoj kaj forkuris el la koncentrejo de la militkaptitoj.

La rezulto de la forkuro estis plena de doloraj aventuroj tra sovaĝa kampo de Siberio. Ili havis iom da mono kaj provizaĵo, ekzemple pano kaj salo. Tial ili havis pli da libereco se troviĝis loĝantoj. Sed en neloĝata, sovaĝa distrikto ili povis fari nenion krom plenforte trabatisian vojon en la grupo de dekelkaj kolegoj. La fervoja linio estis disrompita en diversaj punktoj inter Siberio kaj Eŭropo. Ili konkeris malfacilon per sia propra intelekto kaj peno.

Mi lernis la gravecon de ĉevaloj kaj akcesora posedaĵo el tiu verko. Foje la salo estis pli valora ol oro. Same ankaŭ tabako kaj alumeto. Kiam ili sukcesis akiri cervon kontraŭ sako da salo, ili ne povis atendi ĝian kuiradon. Ili amasiĝis ĉirkaŭ la buĉita cervo kaj komencis suĉi ĝian sangon kiel sangavidaj bestoj. Tio estis ekster nia imago. Kiuj vivas en stabila socio, tiuj ne povas imagi ekstreman situacion kiu ĉirkaŭas ilin. Tia epizodo klare montras ĝin per la fakto.

La rifuĝa vojaĝo estis certe dolorplena kaj ne antaŭvidebla. Ni jam aŭdis multe kiel kruela estas la milito al ni ĝenerale. Sed la aŭtoro skribas la historion kun tre objektiva sinteno. Tia estis lia karaktero kaj kariero. Tio klariĝas poste en lia nova verko "Maskerado ĉirkaŭ la morto".

Modernaj Robinzonoj – aŭ “Fuĝo tra siberia tajgo”

Sibayama Zyun’iti

Jen estas nefikcia “mi-novelo” de Teodoro Schwartz, pri aventuro de taĉmento da homoj – militkaptitoj el diversaj eŭropanoj en japana militkaptitejo ĉe Habarovsk, siberia urbo en Rusio. La kialo de militkaptiteco estas tre malfacile kaptebla, sen la Enkonduko fare de Humphrey Tonkin, des pli al ni, ĉar la militkaptitejon administris japanoj. Sed en 1918, la kaptita oficiro ricevas salajron je 50 jenoj. Laŭ iu fonto, tiun sumon en la japana ĉeflando ricevas novica instruisto, do ĝi estas sufiĉa por teni vivon en la kaptitejo – sed kompreneble la kaptitoj deziris ege hejmeniri.

La antaŭa duono de la novelo priskribas la kaptitejan vivon kaj intencon fuĝi, kaj la posta duono, vera fuĝo – kvankam ili ne estas police persekutataj. Ilia aventuro estas kontraŭ feroce natura en la somera Siberio – ĉar vintra Siberio malebligas veturon – inter arbaro nomata tajgo, amikemaj indiĝenoj kaj precipe kontraŭ inundantaj riveroj. Mi miras je la bona disciplino ene de la fuĝanta teamo. Jes, ili ne perdas humanecon. Tiu ĉi punkto estas la plej bona virto de la rakonto, mi opinias.

La aventuro finiĝas tiam, kiam la teamo renkontas civilizitajn homojn. Mi supozas, ke ili havis malfacilon ankaŭ inter civilizeco, sed la rakonto nur aludas je feliĉo – fakte la aŭtoro sukcesis publikigi tiun ĉi Esperantan novelon kelkajn jarojn poste.



Niaj Klasoj kaj Kursoj

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Rudimenta kurso de Doi Ĉieko (de apr. 25 ĝis jul. 18)

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas “Rakontoj sub la lito” de Antoaneta Klobučar. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.